
Turangoj 26 Luko

2-a trimestro 2012



En tiu numero vi legos..

En Tours, la strato Julien Le Roy troviĝas proksime al la "Tour de l'Horloge". Dank'al Dominique Baron oni komprenas, kial la urbo honoris tiun scienciston tie.	p.1 p.2
Jean-Jacques Moreau daŭrigas la tandeman promenadon sur insulo Kubo.	p.2 ĝis p.4
El okdekjaraj leteroj de Emile Bézier, Jacques Gaumé eltiris frazojn, kiuj temas pri Esperanto kaj pri la esperantista movado.	p.4 ĝis p.7
Sankta Marteno ne nur famas en Tours, Franca Cipriani rakontas italan legendon, kiu laŭdas lin.	p.7 p.8
Bérengère Turbillon prezentas la libron "Sonĝoj de kristalo", ŝi konsilas al vi ĝian legadon.	p.8
André Aude memoras pri la 48-a U.K. en Sofia (Bulgario), en kiu li partoprenis en 1963.	p. 8

Julien Le Roy kaj la horizontala horloĝo


Julien Le Roy, naskita en Tours en 1686, mortinta en Parizo en 1759, estis franca sciencisto, horloĝisto de la franca reĝo Ludoviko la XVa.



Li estis akceptita en 1713 en la horloĝista korporacio de Parizo kaj superis la anglojn prie. Pro tio, Voltaire diris al unu el liaj filoj, post la batalo de Fontenoy : « La marŝalo de Saxe kaj via patro batis la anglojn. » Le Roy iĝis reĝa horloĝisto en 1739.

Le Roy elpensis la "horizontalan horloĝon", nova aranĝo de la radoaraj aksoj de la konstruaĵa horloĝo (dika horloĝo). Efektive, li lokis ĉiujn aksojn de la radoj en sama ebeno horizontala anstataŭ meti ilin unu super la alia en vertikala kaĝo.


Li publikigis en 1737 detalojn pri tio en la libro de Henry Sully titolita *« Règle artificielle du temps, seconde édition, corrigée et aug-*




Horizontala horloĝo, laŭ la plano de Le Roy.

mentée par M. Julien Le Roy ».

La ĉefaj avantaĝoj de tiu aranĝo estas la jenaj : necesas malpli de pecoj, do malpli da laboro kaj malpli da krudaj materialoj; la frotado estas plej malmulta, do ebleco uzi streĉopezilojn malpli pezajn, radojn pli malgrandajn kaj la vivdaŭro estas pli longa ; la prizorgado estas multe pli simpla ; pli granda facileco de konstruado. Ŝajnas, ke Le Roy ne fabrikis mem iun horloĝon. Tamen, li gvidis la konstruadon de diversaj horloĝoj. Ekzemple, en 1769, Marin Pépin faris la horloĝon de la centra konstruaĵo de la kastelo de Versailles sub lia gvidado. Do la horizontala horloĝo anstataŭis la vertikalan horloĝon.



la horizontala horloĝo



la vertikala horloĝo

Dominique Baron

LA TANDEMA TRAIRO EN KUBO (sekvo)

La morgaŭan tagon ni dormos ĉe familio, kiu ne havas la rajton gastigi iun sed havas monbezonon. En tiu familio ĉiu ano laboras ekstere. Kvankam ĉiuj perlaboras, la meblaro mankas. La tablo estas farita el tabuloj, la strukturo el porbetonaj ferŝnurimitaj stangoj same kiel la brakseĝoj. Kia estas la meblaro, kiam neniu familiano perlaboras ?... mi scias... ili sidiĝas surgrunden. Ĉiutage mi pensas pri la kanto « Sajnas al mi ke la mizero estus malpli peniga sub la suno ». Kvankam malriĉaj, ĉiuj fieras kaj dignas. Kiam oni paroligas la kubanojn, estas male, sufiĉas paroli pri la estonteco, ĉiuj silentas kaj ekploras.

En tiu vilaĝo, la etoso fias, fidenoncistoj svarmas. Frumatene ni foriras.

Necesas scii ke ĉie staras domoj por fidenoncistoj. Oni nomas tiujn domojn CDR (Komitato Defenda pri Revolucio). La anoj pririgardas siajn najbarojn kaj denoncas ilin se necese. Ekzistas ankoraŭ pli ol 100.000 CDR en la insulo, estas prefereble aniĝi ĉar dank'al tio oni povas havi avantaĝojn. Pri ĝi, neniu kubano parolis, mi legis tiujn informojn en la biblioteko de vojaĝemulo « Gallimard ». En kelkaj lokoj oni estas trankvilaj, en aliaj, male, dependas de estraro. Persone mi pensas, ke iam tiuj lokoj malaperos, sed kiam ? Iom post iom oni sentas ke la premilo malstreĉiĝas.

Jen, ni eniras en la Verdan Koron de Kubo.

SANKTA-KLARA. Sur la ĉefa placo ni konatiĝas kun paro, ili promenas kun siaj du infanoj, ili veturas per tandemo. Estas permesite bicikli plurope.

Ĉi-tie estas la urbo de la fama « ĈE » (Guevara).



Lia altega statuo staras sur la Placo de la Revolucio. Ni kolektas teron por ke nia kuzino disŝutu ĝin ĉirkaŭ la tombon de sia edzo.

Ni vizitas la lokon, kie la ĈE elreligis trajnon, kiu enhavis militistojn de Baptista. Tio okazis en la jaro 1958.

La kubanoj parolas ofte kaj fiere pri la ĈE, male neniam pri Fidel Kaj

Raŭl.

Sur la mezurba placo, oldulo promenigas infanojn en karioleto tirata de kaprino, pro la varmego la kompatinda besto tiras malrapide..

La urbo Sankta-Klara estas kreita de familioj el la urbo Remedios. Ili forkuris ĉar la piratoj rabadis ilin. Tio okazis en la jaro 1689. Baldaŭ ni alvenos en la nacian parkon « Topes de Collantes », ondoforman kaj arboplenan, 770 metrojn super la marnivelo. Eŭkaliptoj, cedroj, mahagonoj staras multope senvualante la naturan belecon. La tempo estas ekstertempe, ĝi ŝvebas.

Al TRINIDAD. Por atingi la belulinon oni devas suferi, la montaro soras pli ol sobas, la vojo estas ĉu sen tegaĵo, ĉu tute difektita, tie la grundo estas por kvarpelradoj, ne por bicikloj, sed, mia Dio, kia tera Paradizo ! Por atingi tian paradizon oni devas trairi la tiean purgatorion. La naturo estas sovaĝa, la koloroj, la suneroj, kiuj aperas inter la mangrovon, multaj varioj da orkideoj enkreskas la arbojn ie ajn sur branĉoj. En la valfundo fluas rojo. Meze de nenie en la arbaro staras kafejo, la kelnero parolas iomete la francan, mi donacas al li ejfelturon, per hispana akĉento li diras « joli ».

Ni staras sub la tropikoj. La papagoj kantas kaŝante sin en la mangrovo. La arboj estas gigantaj. Por gustumi la momenton kaj la paradizan lokon ni malakcelas. La deklivoj estas tiel krutaj ke ni ofte elseliĝas por antaŭen puŝi niajn rajdobestojn. La vojtegaĵo konsistas el rastita betono por ke la pneŭoj ne joru. Kiam la aŭtobusoj uzas la vojon la pasaĝeroj elbusiĝas por ke la veturilo ne retroiru. Por bonigi la aferon la temperaturo altegas. Nia haŭto ŝvitas, la spiro malfacilas, la koro batas tiel forte, ke ŝajnas al mi ke ĝi volus elŝpruci el la brusto por malrapidi. Feliĉe mi ne surhavas korfrekvencmezurilon ĉar ĝi eksplodus. Mi ofte ŝatas superi miajn homajn limojn.

Post longa soriro, ni ripozas antaŭ la kruta kaj danĝera sobiro, la gudro estas truplena, kiam ĝi malaperas la vojtegaĵo gruzas. Ĉe la fono, ekaperas TRINIDAD. Ĝi kuŝas flanke de Karibo. Sunsobiras al Meksiko. La urbo estas komuna havaĵo de homaro.

En la poŝtoficejo svarmas oficistoj dekoble pli nombraj ol klientoj. Por ke neniu ŝtelu niajn poŝtkartojn ni postulas de oficisto ke li ŝtampu antaŭ niaj okuloj la poŝtkartojn. Ni pravas ĉar la ne ŝtampitaj sendotaj poŝkartoj neniam alvenos al adresuloj.

En la urbo, belegaj domegoj kun skafaldoj staras ruiniĝante. Kio iĝos tiuj domoj ? Kio okazos post kelkaj jaroj... sur preskaŭ la tuta insulo tielas. Mono mankas. Se la komercado estus pli libera la aferoj boniĝus. La ĉefa problemo estas ke neniu devas riĉiĝi, eĉ iomete, ĉiuj devas esti malriĉaj, tio signifas egalecon…

Kvankam la kirko estas ŝlosita, ni provas eniri dank'al la helpo de sakristiano kiu diras al ni « petu la ŝlosilon de la pastro kiu loĝas apud la



Preĝejo Saint-François d'Assise en Trinidad

kirko ». Ni provas, la pastro estas afabla, li vizitigas al ni la katedralon. En ĝi kantistaro trejniĝas, ni estas la nuraj vizitantoj.

Ĉirkaŭ la katedralo, kelkaj domoj estas bone zorgitaj, ili altiras la turistojn, muziko eliras la domaron tra ĉiuj aperturoj. Ĉiuj stratoj estas pavumitaj, la tegoloj de tegmentoj estas pastelkoloraj. La muzeoj multnombras.

La maristo Diego Velasquez estas la fondinto de l'urbo en Januaro 1514, iom kuntiriĝa de Kariboj, ĉe la enmariĝo de Rio Arimao, Velasquez kun liaj homoj venkis la Indianojn «Taino » kiel sklavoj, sed ĉar ili mortis elĉerpitaj kaj malsanaj, la kolonianoj komencis la importon de nigrajn sklavojn el Afriko. En la 17ª jarcento la regiono altiris piratojn kaj korsarojn, kiuj ruinigis la ĉefan urbon Sankti Spiritus sed indulgis TRINIDAD-n, kies kontrabando kaj komerco pri sklavoj konsistigis la ĉefan fonton de riĉaĵoj.

Nun, la turismo anstataŭigas la kulturon de sukero.

En Trinidad, neniu ŝildo multkolora rajtas stariĝi. Kelkfoje, filmfaristoj el la mondo faras filmojn. En multaj kafejoj oni festas nokte kiel tage.

Kiam la pordoj de domoj estas malfermataj oni povas admiri belegajn internajn kortojn kun atrioj. La veturadoj okazas ĉu surdorse de azeno ĉu sur poneoj.

Sur Plaza Mayor aristokratoj konstruigis palacojn. La pavumitaj stratoj havas mezan pluvkanaleton. Legendo asertas ke guberniestro, estante lama, povis marŝi pli facile dank'al pluvkanaleto. En tiu epoko, en malnova domo pri privataj banoj, romana stilo, fonto elkraŝis akvon de kolojno por la virinoj kaj brandon por la viroj. Hodiaŭ ne !



Kiel en multaj urboj la kubanoj promenigas siajn birdojn en kaĝo, kiel en Francio oni promenigas la hundojn.

Ni vizitas lignaĵistejon, la lignaĵisto klarigas ke la metilernantoj eklernas kiam ili iĝas 15 jaraĝaj. La metilernado daŭras 2 jarojn, la pratiko okazas en la laborejo, la teorio en la lernejo, poste, la metilernanto ekzameniĝas.

Forlasante kun ega bedaŭro Trinidad-n, post kelkaj kilometroj, ni ekvidas en la kampoj altan turon, ĝi estis uzata por kontroli la sklavojn.

Johano-Jakobo

80-jaraj leteroj (sekvo)

Ĉi-foje el la leteroj de Emile Bézier mi elektis frazojn, kiuj temas pri Esperanto : La lingvo, la grupo de Tours, la movado…

Tio estas unu el grandaj ĝojoj kę donas Esperanto, faligi la lingvajn limojn kiujn disigas la popolojn. (W, 25/10/30)

La 5an de Novembro komencos la esperantkursoj. Ni dum du lastaj monatoj, propagandis ĉe niaj kamaradoj, por elirigi el ilia neagado ilin. Fine ni vidas la rezultojn.

Mi estas tre feliĉa kę la kursoj rekomencas por povi paroli Esperanton kun miaj kamaradoj. En mia estonta letero mi diras al vi se mi varbis multe da adeptojn. Ni esperu kaj laboru por disvastigi la lingvon kies uzado devas kunigi ĉiujn popolojn ĉar ili sin komprenos unuj la aliaj. (W, 4/11/30)

Kaj mi havas tiun ĉi plezuron dank'al nia bela lingvo, per kiu ni povas nin kompreni reciproke, kial tiel ni estus fratoj. Bedaŭrinde, ĉiuj ne komprenas tion, kaj pri nia esperanta kurso kiu ĵus malfermis, iomete da kamaradoj respondis al nia voko. Nur 20 novaj esperantistoj lernas Esperanton. Kaj inter ili, 10 eble finos la tutan kurson. Fine ni faros nian eblecon por kę ĉiuj finas ĝin. Tamen ni havas bonan kursgvidanton. (W, 16/11/30)

Lasta merkredo dum la daŭro de nia kurso, du germanaj kamaradoj (silezianoj) traveturante tra Eŭropo vizitis nin. Goje mi parolis kun ili. Jam ili vizitis bicikle : Svision, Italion, Algerion, Hispanjon kaj Franca sudon, kaj nun ili reiris Germanion trapasante en Parizo, Verduno, Metzo kaj Strasburgo. Cie kie ili iris, ili estis akceptitaj de la esperantaj grupoj. (W, 28/11/30)

...kiam mi skribis vian leteron, mi ĵus helpis kamarado de mi, por skribi leteron por lia germana korespondanto, ĉar mia amiko estas ĵus komencanto en esperanto, kaj mi, ĉiam helpas lin por respondi al sia korespondanto. (W, 21/12/30)

Okaze de la nova jaro, mi akceptis hejme, preskaŭ, mian tutan familion, kaj post la vespermanĝo, mi, interparolante, priparolis pri Esperanto. Mia bofrato, vidante vian leteron, kiu estis sur mia malgranda skribotablo, demandis al mi klarigojn pri la internacia lingvo. Mi montris al li, la diferentajn leterojn, kiujn mi posedas, kaj tradukas kelkajn al li. Mi klarigis al li kiom estas facila la lernado de Esperanto, kaj ankaŭ ĝia utileco, li meditis pri tio, kaj hodiaŭ mi aĉetis por li Esperantalernolibron.

Mi estas tiel kontenta pro tio, kiel vi estis kontenta, pro la pago, per neesperantisto, de la kotizo kaj abono je « Sennaciulo » por via Sovetia kamarado. (W, 8/1/31)

Diru al ŝi (Linda), *ke mi estos feliĉa kiam mi povos korespondi kun ŝi por ekscii ŝian opinion pri tio kaj pri la rajtoj de la virino, do, ke ŝi rapide lernas Esperanton. (W, 26/1/31)*

Vi skribas al mi, ke en Dresdeno, la socialistoj kaj la komunistoj ne kune laboras, por la disvastigo de Esperanto. En Francio tio okazas same, ĝis nun la franca laborista esperantista Asocio ne estis dividita sed de kelkaj semajnoj, tie, ankaŭ la komunistoj fiagas por estri ĝin. Mi ne scias se ili sukcesos, tio kaŭzos grandan diskutado en la nacia kongreso kiu okazos okaze de la paskafestoj, en Nancy. Sendube, okazos divido, sed kiel tiu kiu okazas en S.A.T.

Lastan vendredon, mi ricevis el Ruslando, la « Internaciisto »n. Mi legis ĝin, sed mi opinias, ke la rusaj kamaradoj, malbone laboras pri la disvastigo de Esperanto, ĉar tie ili volas altrudi la komunismon, kaj estri la gvidadon de Esperanto tra la tutmondo. Sed laŭ mia opinio, ĉiuj komunistaj konceptadoj ne povas esti akceptitaj de ĉiuj laboristoj. Ĉu vi opinias kiel mi ? Mi skribis tion al mia rusa korespondanto, kaj li ne scias, kiel li devas respondi al mi, ĉar li, ankaŭ ne deziras la dividon en S.A.T. (W, 8/2/31)

Mi deziras, ke fraŭlino Linda, rapide lernas Esperanton, por povi korespondadi kun ŝi. Mi estas tre feliĉa se mia poŝtkarto plezurigis al ŝi.

Kiel mi lasis supozi al vi : la komunistoj nun, estas la plimulto en nia kurso... lastan lundon oni voĉdonis, por scii kiel oni devas agi, pri la opozicio en S.A. T. kaj la komunistoj havis 3 voĉojn plie ol ni (socialistoj). – Vidante tion, mi ekparolis, kaj diris al ili : - « Vi volas disvastigi Esperanton kaj vi kredas, ke tio estas dividante la anojn de S.A.T. kaj F.E.O. (Franca L.E.A.) ke vi laboras bone. Tion mi ne kredas, ĉar mi opinias, ke S.A.T. kaj ankaŭ F.E.O. devas resti nur Organizaĵo por kontaŭbatali kapitalismon, kaj disvastigi Esperanton inter ĉiuj konsciaj laboristoj (komunistoj, socialistoj, Arnakistoj) ;

Jen estas, kion respondis la komunistoj al mi :

« Vi parolas kiel malbona socialdemokrato. »

Tial mi respondis : „Jes, mi estas socialdemokrato, sed mi ne estas fanatikulo kiel vi, kaj mi ne pensas estri ĉiujn laboristajn organizaĵojn, kiel vi faras. Mi opinias, ke ĉiu estas libera, pensi laŭ sia vidpunkto." Tial, ili ne sciis kion respondi al mi.

Antaŭ tri semajnoj, mi aniĝis al la Komitato por la propagando socialista-Esperantista ».Tiu komitato celas : 1° malebligi ke la komunistoj gvidas F. E.O. (franca L. E.A.)

2° kaj celas ankaŭ, kontraŭi la opozicion en S.A. T. Do por propagandi laŭ la vidpunkto de tiu komitato, mi sukcesis presigi du artikolojn, pri Socialismo kaj Esperanto en du provinciaj gazetoj, presataj en Tours : « La Vekiĝo » (Le Réveil) socialista organo, kaj en : La Sindikata Touranio » (La Touraine syndicale) organo de la socialistaj Sindikatoj kaj la du redakcioj permesis al mi, presigi artikolon monate ; en mia estonta letero mi kunsendos la leteron, kiun la komitata sekretario sendis al mi. (Tiu letero estas tuta skribita en Esperanto).

Kiel vi mi opinias ke la sovetanoj estas preskaŭ ĉiuj, komunistoj sed ĉiuj ne estas fanatikuloj, ol certaj komunistoj el aliaj landoj. Ĉar la plimulto el la komunistoj laboras, tiel kiel la faŝistoj, kaj ili laboras pli kontraŭ la laboristoj, ol kontraŭ la kapitalistoj.

Nun pri la S.A.T. kongreso. Sendube mi ne iros, ĉar dum la Julia kaj la Aŭgusta monatoj, la malfeliĉaj fervojistoj havas multe da laboro ĉar estas la momento, kie la riĉuloj multevojaĝas kaj pro tio okazas multaj vagonaroj, kaj oni ne povas havi libertempon. (W, 16/2/31)

Mi ĝoje konstatas, nun, ke la komunistoj, sendube, ne estas la plimulteco en F.E.O. (franca L.E. A.), ĉar ili ne varbas multajn grupojn en Francio, kaj lastan lundon, mi ricevis leteron de la sekretario de la Propaganda Komitato Socialista Esperantista en kiu li skribas al mi, ke multaj kamaradoj esperantistaj petas esti anoj de la Socialista Frakcio. Se la enskribiĝa movado daŭras, ni, socialistoj, estos la plimulteco en la F.E.O. kongreso, kiu okazos en Nancy dum la paskfesto. Ni laboras kaj laboros la plej eble plej por sukcesi, kaj tiel kontraŭbatali la skismulojn. Tiel mi promesis al vi, mi kunsendas la leteron de la sekretario de la propaganda komitato, tiamaniere vi povos vidi kiom ni estas

bone organizataj. (W, 1/3/31)

Nunmomente, oni multe laboras, ĉar la F.E.O. kongreso okazos post tri semajnoj, kaj mi devas multe klopodi por ke la opoziciuloj ne estu la plimulteco, kaj por ke nia Federacio ne estu gvidota de la komunistoj, mi esperas sukcesi. Jam mi varbis multajn atestilojn (pri la fido je la nuna estraro de mia Federacio) de kamaradoj, kiuj estas izolaj en la urbetoj ĉirkaŭe Tours, kaj mi esperas, ankoraŭ, varbi aliajn, ĉar bedaŭre, multaj F.E.O. anoj ne povas ĉeesti la kongreson. Sed se la skismo okazus kaj ke la komunistoj forirus el F.E.O., ni socialistoj jam decidis, organizi alian grupon kaj alian kurson, tiel la komunistoj ne tedegos nin, kaj tiamaniere ni povos bone labori por nia bela lingvo. Via flanke, mi deziras ke en Dresdeno, vi plene sukcesos pri via propono, kaj ke la socialistaj esperantistoj sin grupas por kontraŭbatali la stultajn komunistojn, kiuj estas blindigitaj de ilia fanatikeco. (W, 15/3/31)

Mi estis tute kontenta, kiam mi ricevis vian leteron, kaj mi estas tre feliĉa vidante kiom vi progresas en la studo de Esperanto. Kaj mia kara amiko Walter pravas, esperante ke vi iĝos bona esperantistino. Mi ricevis leteron de li morgaŭ matene kaj mi baldaŭ respondos al li. En mia esperanta kurso estas ankaŭ du fraŭlinoj, kiuj lernas esperanton depost kvar monatoj kaj jam ili komencas paroli. Bedaŭrinde, en Francio, la virinoj ne sin interesas pri Esperanto (L, 25/3/31)

Leginte la cirkuleron de S.E.A. mi estas tre feliĉa konstati, ke via socialista organizo progresas rapide. Ĉar ni socialistoj el ĉiuj landoj, devas agi kuraĝe, peni multe por kontraŭbatali la filaboron de la komunistoj, kies la nura ideo estas : estri la laboristan movadon tra la mondo. Lastan merkredon okazis grupa kunveno traktanta pri la nacia kongreso, kaj tie, ankoraŭ mi devis batali por klarigi al la kamaradoj, ke la opozicio en la nacia federacio estas sama ol la opozicio en S.A.T. (ĉar la tieaj komunistoj diris ke tio ne estas vera, ke nur la nuna estraro de F.L.E.A. ne estas plu inda je nia fido). Post granda diskuto, la grupo, malgraŭ mia parolado, voĉdoni malfidon al la nuna estraro de F.L.E.A. Sed mi devas diri ke ili havas nur tri voĉojn plie ol ni (socialistoj) . Malgraŭ tio, laŭ la leteroj ricevitaj el la diversaj provincoj, ĉe la socialista Esperantistaj Komitato, mi konstatas ke dum la kongreso, sendube la komunistoj ne estos la plimulto. Nun mi volas danki vin, por la foto de via subggrupo, mi vidas ke ĉiuj vi havas rideton ĉe la lipoj. Viaj kamaradoj aspektas bonaj kaj gajaj homoj. (W, 28/3/31)

Du tagoj antaŭ, mi veturis Parizon por viziti la estraron de la Franca L.E.A. por diskuti pri la nacia kongreso, kaj doni al la kongresa delegito la mandatojn, kiujn mi varbis en mia regiono por voĉdoni la fidon al la nuna komitato (ĉar pro mia laboro mi ne povis ĉeesti la kongreson). Mi devas diri al vi ke dum la kongreso mi plene sukcesis, ĉar la komunistoj havis nur 200 voĉojn kaj ni 350 voĉojn kaj pro tio ili estas deviga senarogante obei al la volo de la plimulto. Do la franca L.E.A. ne konos la skismon. (W, 20/4/31)

Antaŭ ol fini mian leteron, mi volas gratuli vin, ĉar Walter sciigis al mi, ke la kursgvidanto publikę laŭdis vin, por via scipoveco en Esperanto. Efektive li pravas ĉar ĉiam vi bone skribas nian belan lingvon. (L, 9/8/31)

Per ĝi, mi konstatas, ke vi havis multe da zorgoj por povi ĉeesti la S.A.T. kongreson. Fine vi sukcesis, kaj tio estas la ĉefa afero. (W, 6/10/31)

En Parizo, la opoziciuloj starigis novan grupon, sed feliĉe, ili ne estas multaj. Tamen per ĉiaj rimedoj ili povas malhelpi la francan L.E.A. propagandi, ili agas kiel en Amsterdamo, ili kriegas kaj insultas la parolantojn. Sendube ili provas realigi la diron de Bata al Glodo (unu el la francaj gvidantoj de S.A.T.) dum la S.A.T. kongreso. « Vi vidos vian francan L.E.A.-n, proksiman jaron. Via L.E.A. mortos ». Laŭ mia opinio, Bata volis diri « Ni mortigos ĝin ».

En Tours la sama afero okazos sendube baldaŭ. Ĉar al nia sekretario ĉeestanta kunvenon de la komunista junularo, kiu li estas, oni diris : « Vi devas provi komunistigi la Tours grupon » sed se li havas simpation por la komunismo, pri esperanto li estus tute senpartia, li respondis : Ne, tion mi ne volas fari ». Baldaŭ okazos kunveno el la esperantistoj por aprobi aŭ malaprobi tiun sintenon. Ni esperas, malgraŭ ke la komunistoj estas la plimulto en nia grupo, ke la fanatikuloj ne sukcesos, ĉar jam multaj kamaradoj (eĉ komunistoj) promesis malaprobi ilin. Kompreneble, se la komunistoj sukcesas, mi forlasos la grupon, kaj kun aliaj kamaradoj, el ili la kursgvidanto, ni provos fondi alian grupon, kaj malfermi novan kurson. Jam mi propagandis ĉe miaj amikoj, kaj ankaŭ sukcesis enpre-

sigi diferencajn artikolojn, en la diversaj regionaj ĵurnaloj (socialistaj kaj sindikataj). Mi ricevis leterojn de diversaj kamaradoj, promesantaj al ni sian helpon por havigi al ni kursejon. (W, 6/10/31)

Kiel mi antaŭvidigis al vi en mia lasta letero, la skismemuloj tute triumfis en nia Grupo, ĉar ni estas nur 4 kiuj voĉdonis kontraŭ la Opozicio. Do, de nun mi ne volas plu partopreni la vivon de la Grupo, kaj mi intencas kun miaj samideanoj starigi socialistan Grupon kaj samtempe provi malfermi Esperantistan kurson, jam ni havas kursejon, sed antaŭ ol komenci, mi atendas la respondon de la franca L.E.A. al kiu mi skribis lastan semajnon. (W, 31/10/31)

Koran dankon por via letero, kaj mi deziras longan vivon al la nova grupo de vi fondita, ĉar estas necesa ke la gejunuloj ĉiam iras antaŭen por kaj per nia kara lingvo, kiu estas la plej bela kaj potenca ilo por unuigi la laboristaron. Mia flanke, mi multe penas por sukcesi fondi alian Grupon, sed mi skribis al la gvidaro de la franca L.E.A. por ĝin informi pri mia intenco, kaj respondante al mi ĝi petis min atendi ĝis la venonta jaro por tion fari ĉar la komitato de nia L.E.A. intencas ekŝigi la opoziciuloj je la fino de la kuranta jaro. (W, 29/11/31)

Pro mia malsano mi ne povas viziti la kamaradojn, sed tamen mia plej intima kamarado de tempo al tempo vizitas min, kaj al mi klarigas la diferentajn klopodojn faritajn de la socialistaj esperantistoj. En Parizo estis kreita komitato por propagandi esperanton, 20 gekamaradoj ĝin partoprenas. Eĉ unu el la plej bonaj al mi skribis, ke en Parizo, oni intencas fundi Esp-socialistan grupon. (W, 1/2/32)

Vi demandas al mi, ĉu mi legis esperantistajn librojn ? Jes k-do mi legis sufiĉe da libroj esperantistaj. Inter ili "La fundo de l'Mizero" de Kabe. Kiel vi mi opinias la legadon bonega por bone lerni kaj ekzerci nian lingvon. (W, 1/2/32)

Sendube vi ankaŭ ricevis la SAT jarlibron, en ĝi , kun plezuro mi legis ke vi estas 60 SATanoj en Dresdeno. En Tours ni estas nur 6. (W, 26/4/32)

Kiel mi jam skribis al vi, ni starigis novan grupon esperantan en Tours ; la kursoj komencos la 5an de Oktobro, jam ni havas 15 lernantojn enskribitajn. Eble tiu nombro al vi ŝajnas eta, sed ĝi multe kontentigis min, ĉar la Tours-laborintoj, eĉ pri la esperanto-movado, estas disigitaj de la politiko. Bedaŭrinda tio estas, ĉar ne estas tio, kio kreskigas la francan esperantistaron. Ĉu vi legis en la lasta « Sennaciulo » la protokolaron de la S.A.T. kongreso en Stutgart ? Kion vi opinias pri la vidpunkto de la Aŭstria L. E.A. ? Mi opinias ke oni ne devas ŝanĝi la strukturon de S.A.T., ĉar alimaniere S.A.T. ne plu estus supertendenca. (W, 11/9/32)

Vi scias, ĉar mi kredas ke mi tion skribis al vi jam de longe, ke mi deziris, kun la helpo de kamaradoj miaj, starigi Esperanto-kurson. Sed por tion fari oni devas multe klopodi kaj peni ; sed estas kuraĝiga kiam oni sukcesas. La socialista popoldomo al ni bonvoli doni cambregon kaj manhelpon por nin helpi fundi nian kurson. Do, ĝi komencis la 5an de ĉi monato, kaj okazas regule ĉiujn merkredojn. Sed kie ni trafis belegan sukcesón estas ke 60 gekamaradoj ĝin partoprenas kaj el ili 12 virinoj. Neniam ni tion vidis en Tours. Ĉar dum la aliaj jaroj nun 20 gekamaradoj ĉeestis la unuajn lecionojn kaj nun 3 aŭ 4 finis la elementan kurson, do per tio, kion mi skribas vi povas juĝi kiom ni estas kontentaj. En nia kurso estas 18 jaruloj sed ankaŭ 50 jaruloj, ankaŭ penadas lerni Esperanton 3 ĉekoslovakaj kamaradoj ; (L, 24/10/32)

Jacques Gaumé

Legendo pri la ponto super Lys

La kulto pri Sankta Marteno estas multe disvastiĝinta en la kristana okcidento kaj sekve ankaŭ en Italio. Vojaĝante en mia lando, hazarde mi trafis multajn sanktejojn al li dediĉitaj.

Laŭ la historiistoj, Sankta Marteno, episcopo en Tours kaj evangelizanto de Gaŭlio, en la jaro 347 trairis la Aosta-Valon, direktiĝinta al Romo. Lia kulto baldaŭ ekradikis en la regiono, kies li iĝis patrono, kaj kie rapide stariĝis preĝejoj kaj kapeloj. Pri liaj subtilaj batalprovoj kontraŭ la diablo, ekfloris multnombraj legendoj. La plej konata estas tiu pri la ponto super Lys.



Gravuraĵo de Albrecht Dürer (1494?)

Trairante la Aostavalan regionon, Sankta Marte-

no trovis ĝin barita pro la disfalo de la suprediri-ta ponto, kiun, laŭ la indiĝenoj, la diablo mal-ebligis rekonstrui. Tre kortuŝita kaj deziranta daŭrigi sian vojaĝon, ĉar Papo atendis lin en Ro-mo, la altranga prelato decidis ektrakti kun la diablo. Se ĉi tiu sukcesos dum unu nokto starigi ponton, li rajtos konduki en la inferon la unuan, kiu ĝin transiros.



Ĉe la sunleviĝo, la pontkonstruo al ĉiuj ŝajnis plenumita. Tuj S. Marteno ĵetis viandpecon al alia ekstremaĵo de la ponto, sur kiun ĵetiĝis la hundeto, antaŭe kaŝita sub la monaĥa mantelo. La diablo, tiel trompita, rapidis elverŝi sian ko-leron en la infernon, dum la fidelaro, tre kon-tenta, ekcelebris sian fortikan patronon.

Franca Cipriani

Sonĝoj de kristalo

Tiu bela titolo estas tiu de ĉarma sciencfik-cia romaneto akirita de nia biblioteko antaŭ ne-longe.

Knabo kaj knabino, kvankam en pli malproksi-maj landoj, Japanio kaj Brazilo, renkontiĝas en sonĝoj. Ambaŭ tre ŝatas kristalaĵojn.

La patro de la knabo iam laboris en la krista-lejo de Arko, en norda Francio kaj la knabino ri-cevis donace de la patro kristalan vazon, kiu transvivis grandan tertremon kun la knabino, protektita de la noktĉemizo.

Tiu pasio, kaj ankaŭ hazardaj renkontoj orientigas iliajn studojn, kaj ambaŭ renkontiĝas kaj rekoniĝas en la halo de universitato pri Ar-toj, en Kantono, Ĉinio. Ili enamiĝas kaj decidas iri sur la loko de la kristalejo de Arko. Vi mem malkovros la finon.

Lerte kaj simple verkita, tiu verketo de 80 paĝoj, plena je belaj kaj bonaj sentoj, plaĉe le-giĝas. La romanisto Jérôme Leroy tre lerte kaj objektive priskribas la mondon renversitan kon-sekvence de klimataj kaj sociaj katastrofoj.

Agrablan legadon deziras al vi…

… Bérengère Turbillon

Rememoroj pri jaro 1963

Mia edzino kaj mi partoprenis en la univer-salan kongreson de 1963 en Sofia, kaj inter kelkaj malagrablaj aferoj okazintaj ekzemple erare de fervoja oficejo, kiu, anstataŭ rezervi por ni sidlokojn en la sola pasaĝervagono Paris-Sofia, lokigis nin en iu alia haltante en Trieste, kio devigis nin ŝanĝi kvar fojojn survoje.

Mi longe memoros pri la ekskurso por ĉeesti la inaŭguron de la Esperanto-domo sur la monto Vitoŝa. La vetero estis belega, de tiu loko ni admiris la katedralon de Sofia, kies oraj kupo-loj brilis sub la suno, estis tiom bele ke mi stul-te ne pensis ŝirmi min kaj ricevis sunbaton pro kio mi terure suferis ĝis la reveno en Francio.

Sed venas la strangaĵo : por iri de la rende-vuo ĝis la celo de la ceremonio, la kongresanoj plenigis tri specialajn busojn. Poste por reveni estis nur du busoj. La organizantoj ne kompre-nis kial ne ĉiuj enaŭtobusiĝas. Ili vicigis nin duope kvazaŭ soldatoj por nin nombri, kaj fine ne trovis solvon ! Do ni, malfacile, kun peno kaj post longa atendado, devis trovi lokon en urbaj busoj por reveni.

Nun ni ekridetas pri tio, sed, surloke ni kole-ris, precipe dum ili vicigis nin kiel soldatojn.

André Aude

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr